

Reinhard Arfsten,

Sopiro

tradukita de Manfred Retzlaff

En aŭtun-vesper' mi iris
for de l' homoj ĝis urbfin',
staris mi sur kamp', sopiris,
sentis forlasita min.

Mi birdvoĉojn aŭdas ie
enaere super mi.
Kio ilin tiras tie?
Ĉu sopiro estas ĝi?

Se mi povus, kun ilia
svarm' mi flugus tra l' aer',
el fremdujo for al mia
kara hejminsulo Fer'.

*Traduko de la Frisa poemo "Lingen" de REINHARD ARFSTEN (*1897 – †1971) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2000-17-13.*

MR-321-1b / Arg-323-655 (2005-08-26 11:26:12)